Malpermeso por E-sanktuloj vivantaj

Freneza Revuo Esperantista Ŝatanta Observi

# FREŜO

N-ro 9 (52)

La septembro2017j

*La retrevuo estos senpaga tiom longe...*

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin :-)

Wrzesień 2017 r.

**Mi trovis por vi en TTT-ejo**



Se vi volus elŝuti pli fruajn numerojn de "**FREŜO**" kopiu unu el la subaj ligiloj kaj engluu ĝin en la ĝusta loko en retumilo aŭ simple enskribu ĝin en retumilo:

**FREŜO** n-ro: 1/44 https://goo.gl/TNJo7O

**FREŜO** n-ro: 2/45 https://goo.gl/TnY1zj

**FREŜO** n-ro: 3/46 https://goo.gl/o6myuE

**FREŜO** n-ro: 4/47 https://goo.gl/tveLIR

**FREŜO** n-ro: 5/48 https://goo.gl/Y6erJu

--------------------------

*Se vi havus proponojn, materialojn por la venontaj numeroj de ĉi revueto - skribu al mi:*
**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**

**Kunlaborantoj:**

*Eduardo KOZYRA*
*Mirka KUBICKA*
*Franciszek WITUCKI*
*Henryk WOWERI*

Recenzoj:
pri "**FREŜO**" ĉiam atendataj
*Mi petas kritiki -*
*speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn retadresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**

*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso: fresxo@protonmail.com*
*Skajpo:* **marianzdankowski**

*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**
*mi povas gvidi kvizo(j)n dum via E-arango !*
*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*
















# Jen diras la Ĉefredaktoro

*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj* **N-ro 9** (52)

**FREŜO**

**La septembro 2017j** | La retrevuo estos senpaga kiel tipaj retrevuoj | Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin | **Wrzesien 2017**





*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*
*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

## La ĉefredaktoro skribas:

**Mi rekomendas ĉi-numere:**

**- Forpasis Marjorie Boulton nia Esperanta Giganto**

**- kial oni ne lernas Esperanton - interesaj pensoj de Solis (Liu Xiaozhe) el Ĉinio**

**- faktoj nekonataj por kristanoj - en la "Virtuala Vivo" sur la paĝo 12 kaj 14**

**- nova novelo de Barry Friedmann ( via opinio pri ĝi estas ankaŭ grava)**

**- ĉu por kuracistoj ni estas sanaj ? - legu en SANA VIVO sur la paĝo 20**

**Krom tio - pli multe ol kutime - anekdotoj, ŝercoj, enigmoj, demotivatoroj, spritaĵoj, desegnaĵoj, ktp...**

**Via Ĉefredaktoro**
**Marian ZDANKOVSKI .**



# LEGANTAJ REAGOJ

Kara samideano!
Mi kun plezuro tralegis vian interesan ĵurnalon.
Gratulojn! Tre plaĉas al mi.
Kun amikaj salutoj,

**Manfredo SIEBER - Germanio**

**kara marian:**
**kiel vi fartas?**
**koran dankon pro via informo pri enhavo de 'fres'o 8/51.**
**mi vidos gxin. mi elkore dankas vin.**
**kore, etsuo**

**Etsuo Mijoŝi - Japanio**

Dankon Marian,
Mi ne solvis la krucvortenigmon !
Tamen se mi ekscius ke la vertikala enhavo korespondas al la horizontala, eble mi solvus.
Mi ne ankoraŭ legis ĉiujn tekstojn sed miris la bildojn J
Elkorajn salutojn, **Joseph**
Post legado eventuale mi kontribuos …

Tre interesa revuo, Gratulon !
Mi komprenas ke ĝi estas senpaga,
do mi ŝatus ricevi ĝin regule en mia ĉi tiu retpoŝtadreso...
Mi plue diskonigos ĝin en nia "Esperanto Türkiye" facebook grupo, kaj en nia revueto Turka Stelo.
Ĉu vi havas ian enkondukan tekston por tio?
Jen ligilo al la arkivo de nia revueto "Turka Stelo":
https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revueto/
Komprenebele ĝi estas nekomprarebla kun la via....
Se iu volas ricevi ĝin mi volonte abonigos lin/ŝin...
Amike

**Vasil KADIFELI (Istanbulo, Turkujo)**

Kara Marian
Bonvolu sendi al mi vian belan kaj sagxan revuon.
Cxu vi ankaux povas sendi al mi la unuajn 5 numerojn?
Dankas kaj bondeziras vin

**Enrique ELLEMBERG** Fremont, Kalifornio,Usono

**Dankon kara, kiel cxiam tre fantazieca, enhavricxa, amuza kaj inteligenta revuo.**
**Amike Bardhyl**


**SELIMI Bardhyl - Tirana, Albanio**

Saluton kara amiko Marian ,pardonon ke mi reskribas al vi malfrue, mi volas tre danki por la FRES-o ,tre bonega legado pri ĉio , tio estas por mi ankau bonega lernado .
Mi jam malmulte lernas car mi ne havas tute tempon, sed kiam mi ekvidos la novan numeron mi estas tuj gxojigita.Cxu presitan formon vi ne faras?
Kun saluto

Antonin Krejcir EK Prerov Ĉeĥio

Mi petas pri tuja forigo de ĉi tiu mia retadreso (mi ne vidas la celatan adreson) el la dissendolisto de FREŜO.
La kaŭzo estas, ke mi la unuan fojon enrigardis en ĝin kaj kelkkiale ŝokiĝis pro la enhavo.

**Cyril BROSCH - Germanio**



Ĉu volas vi anglon, fraŭlino?
- La anglon, la anglon? Ho, ne!
Li flegme kaj pigre prifikas malvigle.
Ne volas mi anglon, ho ne!



Ĉu eble albanon vi volas?
- Albanon, albanon? Ho, ne!
Alban' - komunisto, servist' de Mefisto.
Albanon ne volas mi! Ne!



Ĉu eble arabon vi volas?
- Arabon, arabon? Ho, ne!
Ĉe knabo arabo pisil' kiel klabo.
Arabon ne volas mi! Ne!



Ĉu eble armenon vi volas?
- Armenon, armenon? Ho, ne!
Ja revas armeno pri propra haremo.
Armenon ne volas mi! Ne!

# Forpasis Marjorie Boulton

**La 30-an de aŭgusto, en la aĝo de 93 jaroj, forpasis Marjorie Boulton, unu el la plej ŝatataj Esperantaj verkistoj, honora membro de UEA.**

La verkista kariero de Marjorie Boulton komenciĝis en 1949, kiam ŝi havis 25 jarojn, per poemaro en la angla lingvo. Post tio ŝi publikigis tridekon da libroj en plej diversaj ĝenroj. Poemoj, prozo, teatraĵoj, literaturaj studoj en la angla kaj en Esperanto aperis el ŝia plumo, sed ankaŭ amuzaj artikoletoj en Monato. La anglalingva publiko tutmonde konas ŝin kiel seriozan literatur-sciencistón, la esperantlingva – same tutmonde – ankaŭ kiel poeton kaj grandan amikon de katoj.

En artikolo aperinta en Libera Folio en 2005 Baldur Ragnarsson skribas: "Marjorie Boulton estas unu el la plej produktivaj kaj ŝatataj verkistoj en la internacia lingvo. Ŝiajn literaturajn verkojn ecigas subtila arto, sincero kaj humanismo. Kaj per siaj edukaj verkoj ŝi scias instrui per idea riĉo kaj amuzi per ĉiam ĉeesta sprito."



En omaĝa parolado okaze de transdono de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen al d-ro Marjorie Boulton en 1998 Baldur Ragnarsson diris:


En sia unua poemo en Esperanto, Marborda ŝtono, verkita en 1951, Marjorie, la poetino, tiam 27-jara junulino, priskribas sian iradon sur marbordo en mizera anima stato, kiel okazas ja ne malofte en junaj vivoj. Ŝi hazarde rimarkas ovoforman ŝtonon inter la rokoj kaj ĝin prenas, la ŝtono viviĝas en ŝia mano, kaj pro ia mistera procezo ŝi sentas strangan bruon de "estonta fido", de "espero nova". La juna poetino sentas transformiĝon en sia animo, transformiĝon el mizero al fido, precize tian transformiĝon sur tiu stadio en sia vivo, kiam ŝi decidis fordoni sin al arta kreado en la internacia lingvo, Esperanto.

Tiu transformiĝo portis en si kreskigan forton kiu rapide produktis abundajn kaj variajn fruktojn: kvar jarojn poste aperis ŝia unua poemaro en Esperanto, Kontralte, ampleksanta malpli ol 273 paĝojn da poemoj, poemoj eksterordinaraj en la Esperanta literaturo, poemoj de virineco en la plej profunda senco, poemoj, kiuj vekus furoran reagon eĉ nun, se tiaj aperus en vaste konata nacia lingvo. Pasis ankoraŭ kvar jaroj, tiam sekvis nova poemaro, simple titolita Eroj, ĉi tiu ampleksanta 349 paĝojn da poemoj, poemoj de plua evoluo de la poezia kreopovo de la poetino, poemoj esplorantaj novajn, pli vastajn temojn sur granda skalo. La fido, kiun simbole vekis la magia marborda ŝtono de juneco, ne estis ia efemera iluzio, ĝi pruviĝis la fakta vero mem.

En la lastaj jaroj Marjorie Boulton pro sia alta aĝo kaj pro malsano ne ofte povis viziti Esperanto-aranĝojn. En 2015 ŝi tamen ĉeestis la Universalan Kongreson en Lille, mallonge rakontis pri siaj memoroj al la granda publiko, kiu kolektiĝis en la libroservo, kaj subskribis kelkajn librojn.

el "Libera Folio"

# V E R A   V I V O


REPORT, DELETE!!!
REPORT, DELETE!!!


Ne kriu al sia edzo
DEMOTYWATORY.PL
Li timu vian vidon


Neniam uzu klozeton en sonĝo
DEMOTYWATORY.PL
Tio estas embusko


DEMOTYWATORY.PL
Unu foto
esprimas pli multe ol mil vortoj


@sanvecino

# Kial oni ne lernas Esperanton?

**La plej multaj homoj trovas Esperanton neinteresa**. Ne indas trudadi la lingvon al tiuj, kiuj ne volas aŭdi pri ĝi. Prefere ol propagandi, indas mem lerni la lingvon bone kaj uzi ĝin en internaciaj kontaktoj.

Komencantoj de Esperanto ofte fervore propagandas tiun lingvon al ĉirkaŭaj homoj.

Ili sentas, ke tiu magia lingvo por ili malfermis la pordon al la mondo. Do ili esperas, ke ĉiuj aliaj homoj ĝuos tiun raraĵon.

Sed tre ofte ili ankaŭ senesperiĝas.

Oni trovas, ke multaj informitoj, ekscitinte pri la ekzisto de la internacia lingvo, nur surpriziĝas pri la artefareblo de homa lingvo, sed ili tuj forgesas ĝin turninte la atenton al alia afero. Iuj scivolaj forlasas la lernadon post nur kelkaj lecionoj.

La komencanto denove estas la sola lernanto en la loko.

Kial? Kial oni ne varme brakumas tiun bonan lingvon kun bela interna ideo? Kial ilin ne interesas tiu lingvo, kiu povas forigi la lingvan baron en la internacia komunikado?

La kaŭzo fakte estas simpla: **multaj homoj tute ne interesiĝas pri la lingva problemo!** Por ili, krom sia gepatra lingvo, la aliaj lingvoj, per kiuj oni povas interflui kun nesamlingvaj homoj, estas tute superfluaj kaj nenecesaj!

La amatoroj kaj interesatoj de iu afero inklinas opinii, ke ilia celitaĵo estas la plej grava afero. Multaj subtenantoj de Esperanto ne konscias, ke por aliaj homoj estas aliaj pli gravaj aferoj ol la lingva problemo.



Solis (Liu Xiaozhe)

**Jes**, Esperanto alportas al vi ĝojon kaj ĝuon, sed multaj homoj ankoraŭ baraktas por la manĝaĵo kaj vestoj, do ili ne havas tempon kaj energion pripensi la bezonon je spirito.

**Jes**, lokaj esperantistoj multe helpas vin dum via vojaĝo en aliaj landoj, sed multaj homoj eĉ neniam foriras el siaj naskiĝaj vilaĝo aŭ urbo.Jes, per Esperanto vi povas konatiĝi kaj interflui kun homoj en diversaj landoj, sed multaj homoj kontaktas aliajn nur en la ĉiutagaj vivo kaj laboro, ne havante aliajn konatojn eĉ en sia urbo.

**Jes**, per Esperanto vi povas legi informojn el diversaj partoj de la mondo, sed multaj homoj ne povas aŭ ne volas legi ĵurnalon eĉ en sia nacia lingvo.

**Jes**, Esperanto estas lingvo kun bela ideo, kaj partopreni en la Esperanta movado estas kontribuo al pli bela mondo. Sed multaj homoj opinias, ke estas multaj aliaj aferoj pli gravaj ol la lingva problemo en la mondo, ekzemple, malriĉo, malsato, medio, akva riĉfonto, klimato, homaj rajtoj, ktp..

Iuj homoj ne lernas Esperanton, ĉar ili neniam aŭdis pri ĝi. Sed plejparto de homoj ne havas intereson al Esperanto, eĉ jam detale informite pri tiu lingvo!

Ĉiuj havas propran intereson. Altrudi la sian al alia estas ne-efike kaj ofte malŝatate.

Estas tute normale, ke oni ne interesiĝas pri Esperanto kaj ne lernas ĝin.

Do, kion ni faru? Ĉu ni ĉesu propagandi Esperanton al aliaj homoj?

Propagandado nepre estas farinda laboro, kiu povas varbi latentajn lernantojn. Sed se oni ne interesiĝas pri nia lingvo, ni ne daŭrigu proponi ĝin al ili. Kaj ni ne tro senesperiĝu. Ĉar ne ekzistas afero, kiu povas altiri ĉiujn homojn. Sufiĉas, ke ĉirkaŭaj homoj sciu pri Esperanto, kaj ili mem elektu ĉu lerni aŭ ne.

Fakte, estas pli efika rimedo propagandi la lingvon Esperanto, nome, **ni mem lernu kaj uzu ĝin en la internaciaj kontaktoj.** Vidinte, ke Esperanto estas utila, la veraj interesatoj lernos ĝin. Ni influu aliajn homojn per nia agado, sed ne per senĉesaj ripetitaj vortoj. Kiel oni admonas iujn religi-anojn: ne nur deklaru vian religion paca, sed ankaŭ agu pace!

**Solis (Liu Xiaozhe)**

La teksto unue aperis en la blogo de Liu Xiaozhe



Ĉu volas vi aŭstron, fraŭlino?
- La aŭstron, la aŭstron? Ho, ne!
Ĉar aŭstro muzikas, valsritme li fikas,
Ne volas mi aŭstron, ho ne!



Ĉu volas vi belgon, fraŭlino?
- La belgon, la belgon? Ho, ne!
Ĉe belgo pro laco velkiĝas la kaco.
Ne volas mi belgon! Ho ne!





Ĉu volas vi viron brazilan?
- La viron brazilan? Ho, ne!
Li tro maltrankvilas, simion similas.
Ne volas mi tiun! Ho, ne!



Ĉu eble bulgaron vi volas?
- Bulgaron? Bulgaron? Ho, ne!
Bulgaro kanajlo odoras per ajlo.
Bulgaron ne volas mi! Ne!

# POLITIKA VIVO







Soldatoj ?

Kiel la mondo vidas Rusion




Banksy pri Britio






# ANEKDOTA VIVO

Ni ŝatas spritaĵojn, sed nur tiam, se ili rilatas al aliaj. Jen kelkaj plej interesaj **pri poloj.** Spritaĵoj rakontas germanoj; Germanio estas najbaro de Pollando.

1. **Kial la polaj novnaskitoj ricevas du pugofrapojn?**
La unuan kiel oni kutimas tion fari, la duan por ke tiu redonu manhorloĝon por akuŝistino.

3. **Kiaj propraj nomoj estas plej ŝatataj en Pollando?**
Klaudia kaj Klaus! (klauen = ŝteli en la germana)

4. **Kiel nomi polon sen manoj?**
Fidinda.

5. **Pri kio temas la unua leciono pri konduklicenco en Pollando?**
Malfermi pordon helpe de klinko.

6. **Kia infano naskiĝos el la rusa patrino kaj la pola patro?**
La infano estos tro pigra por ŝteli.

7. **Kial vi devas atenti por ne damaĝi la biciklantan polon?**
Povas esti, ke li uzas vian biciklon.

8. **Kiel konstati, ĉu la poloj estis en la kosmo?**
Kontrolu, ĉu Granda Ĉaro posedas ankoraŭ radrandojn kaj spegulojn.

9. **Kio pozitiva estas en malvarma vetero?**
La poloj tenas manojn en poŝoj.

10. **Kiam en Pollando estas Kristnasko?**
Du tagoj pli malfrue ol kiam en Germanio oni disdonadis donacojn.

11. **Kion faros rigardanto de futbalmatĉo, kiam la poloj gajnos dum olimpikaj ludoj en 2018?**
Li malŝaltos konzolon kaj enlitiĝos




- **Patrino, mi enamiĝis.**
- Kiel ŝi aspektas? Kiu estas ŝia nomo? Ĉu ŝi scipovas kuiri? Ĉu ŝi devenas el bona familio? Pri kio ŝi okupiĝas? En kiu lernejo ŝi studis? Kial vi diras tion nur nun? Kiam vi havos rendevuon? Ĉu vi venigos ŝin al ni? Ĉu la afero estas serioza?
- … **patro, mi enamiĝis**.
- Al la knabino?
- **Jes.**
- Do ĉio estas en ordo..

Post la morto ateisto eniris inferon. Li frapas pordon, malfermas ĝin diablo, vestita per vestokostumo de Armani, odoranta per parfumo de Hugo Boss …
- **Bonan tagon, mi invitas vin kaj montros nian inferon. Ĉi tie estas dormoĉambroj, ĉi tie duŝejoj, saŭno, solario, oni povas uzi laŭvole.**
La ateisto mirigita ne scias kion pensi pri tio. Ili eniras la sekvan ejon. La longa tablo, plej bongustaj alkoholaĵoj, multaj manĝaĵoj, bonvolemaj prostituinoj, homoj festenas … la ateisto sentas, ke en ĉio ĉi devas esti iu kaptilo. La sekva ejo – biblioteko kun ĉiuj libroj, kiuj estis eldonitaj ĝis nun, diabloj zorgas pri silento, koncentrigitaj homoj legas. La ateisto pli kaj pli miras. La sekva ejo – kaldronoj, homoj boliĝas en gudro, aŭdiĝas hurlado, diabloj per forkegoj enpuŝas en kaldronojn tiujn, kiuj volas forkuri. La ateisto ne eltenis kaj demandas diablon:
- Sinjoro diablo, mi ne komprenas, tie festeno, legoĉambro ĉi tie kaldronoj, gudro …
- **Ne atentu tion, tiuj estas katolikoj, kian inferon ili elpensis, tian ili havas.**




Ĉu eble ciganon vi volas?
- Ciganon? Ciganon? Ho, ne!
Post am' kun cigano minacas malsano.
Ciganon ne volas mi. Ne!



Ĉu volas vi ĉeĥon, fraŭlino?
- La ĉeĥon? La ĉeĥon? Ho, ne!
Dum ĉeĥo seksumas li zumas kaj fumas!
Ne volas mi ĉeĥon! Ho, ne!



Ĉu volas vi ĉinon, fraŭlino?
- La ĉinon? La ĉinon? Ho, ne!
Post dormo kun ĉino flaviĝas vagino!
Ne volas mi ĉinon! Ho, ne!





Ĉu volas vi danon, fraŭlino?
- La danon? La danon? Ho, ne!
Li inon evitas, samsekse koitas!
Ne volas mi danon! Ho, ne!


# VIRTUALA VIVO









# DIFINA VIVO

**Bankisto**
Homo, kiu pruntedonos al vi sian pluvombrelon dum belega vetero kaj, kiam komencas pluvi, tuj reprenos ĝin de vi.

**Skolto**
Infano vestita kiel idioto sub gvido de idioto vestita kiel infano.

**Konsilanto**
Homo, kiu prenos horloĝon de via edzino, diros al vi, kioma horo estas kaj devigos vin pagi pro la informo.

**Diplomato**
Homo, kiu scipovas diri „forfikiĝu" tiel, ke vi ekscitiĝos pro alproksimiĝanta vojaĝo.

**Ekonomikisto**
Spertulo, kiu scipovas hodiaŭ precize klarigi, kial lia hieraŭa prognozo (por hodiaŭ) ne realiĝis.

**Kolegino**
Persono aliseksa, kiu havas „tion ion" pro kio vi absolute ne volas seksumi kun ŝi.

**Informadikisto**
Homo, kiu solvos problemon, pri kiu vi ne sciis en tiu maniero, kiun vi ne ekkomprenos.

**Psikologo**
Homo, kiu observas aliulojn, kiam alloga virino eniras en la ĉambron.

**Statistikisto**
Homo, kiu bone konas ciferojn, sed mankas al li karaktero por fariĝi librotenisto.

**Pastro** (katolika)
Persono, al kiu ĉiuj homoj alparolas per „patro" krom liaj propraj infanoj, kiuj uzas la vorton „onklo".

**Danco**
Vertikala frustriĝo de horizontala dezirego.

**Kapdoloro**
Ofte uzata virina metodo de naskoregulado.

**Intelektulo**
Homo, kiu kapablas pli ol 2 horojn pensi pri io alia ol seksumado.

**Lango**
Seksorgano, laŭ kelkaj senrangigita nur ĝis parolo.

**Monogamio**
Prisubpremata (subpremigita) poligamio.

**Nanosekundo**
Tempo kiu pasas inter apero de la verda lumo kaj homo post , kiu komencas uzi hupon.

**Nimfomaniulo**
Ĉiu persono kiu volus seksumi pli ofte ol nuntempe.

**Grupa laboro**
Ebleco kulpigi aliajn homojn.

**Eterno**
Tempo, kiu pasis de la momento, kiam vi finis, ĝis la momento, kiam vi rajtas eliri el ŝia loĝejo.

**Facila**
Vorto uzata rilate al ĉiu virino, kiu traktas seksumadon same kiel viro.

**Piedpilko**
Tio, al kio virinoj, tute senkonscie, edzinigxas.

**Hardvaro**
Tiu parto de komputilo, kiun oni rajtas piedbati, kiam softvaro ĉesos funkcii.

**Inflacio**
Kauzo, pro kiu vi devas travivi nunan jaron kontraŭ la mono ellaborita pasintjare.

**Kvantumfiziko**
Negro en malluma ĉambro serĉanta nigran katon, kiu ne estas tie..



Ĉu eble egipton vi volas?
- Egipton? Egipton? Ho, ne!
Ĉar li pli ol ĉion amegas mumion.
Egipton ne volas mi. Ne!



Ĉu volas eskimon, fraŭlino?
- Eskimon? Eskimon? Ho, ne!
Ĉar vekas eskimo nur timon sen limo!
Eskimon ne volas mi! Ne!





Ĉu eble estonon vi volas?
- Estonon? Estonon? Ho, ne!
Estono sen mono por ina dispono!
Estonon ne volas mi! Ne!



Ĉu volas vi finnon, fraŭlino?
- La finnon? La finnon? Ho, ne!
De finna koito ne venas ekscito.
Ne volas mi finnon! Ho, ne!

# VERA VIVO














COLECCIÓN VIRIDANS





# VIRTUALA VIVO

Faktoj nekonataj por kristanoj

**La jaro1000 –**
oni establis feston de Ĉiuj Sanktuloj kaj Tago por Animoj.

**XI jarcento –**
La pomeraniaj slavoj deklaras antaŭ episkopo Otto Mistelbach: „Ĉe vi, kristanoj, multas friponoj kaj ŝtelistoj, ĉe vi oni fortranĉas al homoj piedojn kaj manojn, forigas okulojn, torturas en malliberejoj; ĉe ni, paganoj, oni ne faras tiajn abomenaĵojn, do ni ne volas tian religion! Viaj pastroj prenas ĉiun dekan parton de havaĵo de la kredantoj, la niaj vivtenas sin kiel ni ĉiuj per laboro de propraj manoj" (Vivo de Sankta Otto)

**La jaro 1015 –**
post la spertoj de pornokracio oni enkondukis devigan celibaton por pastroj por solvi problemon pri heredo de la ekleziaj havaĵoj fare de iliaj familioj. Ĝis nun la pastroj havis familiojn – la edzinon kaj infanoj.

**La jaro1054 –**
Mikaelo Ceruliusz, patriarko de la orienta eklezio kaj Leon XI ĵetiĝis reciproke per anatemo.

**La jaro 1077 –**
La papo Gregoro VII establis formalan „anatemon", kio signifis forigon de la Eklezio-institucio.


**La jaro 1095 –**
La papo Urban II alvokis kavalirojn de Eŭropo, por ke tiuj unuiĝu kaj formarŝu al Jerusalemo. Tiu estis la unua kruca ekspedicio. La papo anoncis, ke „anatemita estos tiu, kiu detenos sian glavon kontraŭ sango disverŝo". Dum la unuaj ekspedicioj la kristanoj transprenis rozalion. Ĝi servis al la paganoj por preĝi al la diino Kali, adorata en Oriento kiel Virgulino kaj Ĉielreĝino.

**La jaro 1096 –**
Sub influo de la papo Urban ekiras la unua kruca ekspedicio de malriĉuloj, komandita de Piotr el Amiens. La nombro de partoprenantoj de tiu „popola ekspedicio" estas taksata kiel eĉ 180 000 da homoj. La krucistoj signas sian itineron per pogromoj de judoj: en Wormacia, Moguncia kaj Kolonia okazas raboj, murdoj, perfortoj, tute same kiel faris tion saracenoj (tiel oni nomis arabajn tribojn kaj poste ankaŭ ĉiuj, kiuj kredis Islamon). Unu kvarono de la krucistoj mortas pro malsato kaj laco. Parto de tiu ekspedicio kapitulacias ĉe Xerigordan. Tiuj, kiuj konvertiĝis je islamo, estas vendataj kiel sklavoj, kontraŭstarantoj estas senigitaj de la vivo. La 21-an de oktobro ĉe Civetot la ĉefaj fortoj de la ekspedicio estas venkitaj. De tiu krucmilito saviĝis forkurante en Konstantinopolon ĉirkaŭ 3000 da batalantoj.

**La jaro 1099 –**
Amasbuĉado de islamanoj kaj judoj en Jerusalemo. La kronikisto Rajmund skribis: „Sur la stratoj kuŝis stakoj da kapoj, piedoj kaj manoj. Iuj estis pafmortigitaj, aliaj estis faligitaj de la turoj, ankoraŭ aliaj estis dum kelkaj tagoj torturitaj kaj fine ankoraŭ vivaj bruligitaj. Tio estis vera, miriga verdikto de Dio, ordonanta, ke tiu loko estu plenigita per la sango de paganoj." (Historio Francorum qui ceperunt Jeruzalem).

**XII jarcento –**
Sciencisto kaj filozofo, la sankta Tomaso el Akvino (la kreinto de la dua katolika doktrino) predikis, ke bestoj ne havas postmortan vivon nek kunnaskitaj rajtoj kaj fare de ne revokita ordono de Kreinto ilia vivo kaj morto apartenas al ni. La Sankta Francisko asertas tamen ion tute alian.

al la paĝo 14



Ĉu volas vi francon, fraŭlino?
- La francon? La francon? Ho, ne!
Ĉar francon dum danco tuj kaptas fiktranco.
Ne volas mi francon! Ho, ne!



Ĉu eble germanon vi volas?
- Germanon? Germanon? Ho, ne!
En lito germano montriĝas tirano!
Germanon ne volas mi! Ne!



Ĉu volas vi grekon, fraŭlino?
- La grekon? La grekon? Ho, ne!
Seksumi kun greko jen granda fipeko!
Ne volas mi grekon! Ho, ne!



Ĉu eble hebreon vi volas?
- Hebreon? Hebreon? Ho, ne!
En buŝ' de hebreo nur preĝo aŭ veo.
Hebreon ne volas mi! Ne!



Sogni Giuseppe - Ila sorpreso alla fonte dalle ninfe

...el la paĝo 12

# VIRTUALA VIVO - 2

Faktoj nekonataj por kristanoj

**La jaro 1109 –**
La sekva batalo pri Jerusalemo. Jen raporto de senpera atestanto: „Post nelonge ĉiuj defendantoj forkuris de la muroj kaj kuris tra urbo kaj ni postkuradis ilin, pelis antaŭ ni mortigante ĝis la Salomon templo, kie okazis tia amasbuĉado, ke ni vadis en sango ĝis maleoloj. Poste la krucistoj diskuris tra la tuta urbo, rabante oron, arĝenton, ĉevalojn kaj mulojn, prirabadis domojn plenaj de riĉaĵoj. Kaj nur poste feliĉaj, plorantaj pro ĝojo ili iris adori la tombon de nia Savanto. (…) La saracenoj, kiuj restis vivaj forigis la kadavroj el la urbo kaj stakis ilin, la alteco de stakoj egalis al alteco de domoj, Neniu pli frue vidis nek aŭdis pri tia amasbuĉado de paganoj.”

**La jaro 1116 –**
***La laterana koncilio establis pekkonfeso je „orelo”***. Tia formo de la konfeso permesis havi pli grandan kontrolon super la homoj kaj la „median intervjuo/invigilacion”.

**La jaro 1140 –**
Oni kreis kaj akceptis liston de sep sanktaj sakramentoj. Ĝis tiu tempo oni havigis sakramentojn malorde (ekzemple la slavaj pastroj agnoskis kiel unu el la sakramentoj, hartondado. Aldona klarigo: la knaboj ĝis la sepa vivojaro havis ne tonditan ĝis tiu tempo hararon, tial la hartondado ĉe la sepjaruloj havis iasence ritan? ĉiuokaze solenan kadron).

**La jaro 1140 –**
Gracjan establis la unuan kodekson de la kanona juro. Tiun kodekson oni aplikis kiel instrukolekton por pastroj ĝis 1917, ĝis la tempo, kiam oni establis la novan kodekson de la kanona juro. En la kanono „Aliguando” gracjan konstatas, ke „***aborto estas murdo nur tiam, kiam la feto estas jam formita***”. Ĝis kiam la feto ne estas la plene formita homa estaĵo, aborto ne estas murdo.

**La jaro 1147 –**
Krucekspedicio kontraŭ okcidentajn slavojn, opiniataj paganoj. La ekspedicio finiĝas malsukcese, sed ĝi komencas procedon, kies efiko estiĝis ekstermo kaj forviŝo el la eŭropaj mapoj tiujn slavojn, kiuj ne subiĝis al kristianigo.

**La jaroj 1202-1204 –**
IV krucekspedicio iniciatita de Innocenty III por apogi krucistojn en Palestino. Efike de politiko de Henryk Dandalo, soldatoj de Kristo atakis Bizancon kaj akiris Konstantinopolon, rabante riĉaĵojn kaj buĉante la loĝantojn (kristanojn). Fine ili bruligis la urbon. Oni prirabis grandajn kvantojn de oro kaj arĝento kaj skalo de perforto estis neimageble alta, se temas pri tiamaj militaj normoj. Sur la akirita tereno oni establis efemeran ŝtateton, nomata Imperio Latina. Tio sigelis disiĝon de la okcidenta kristianismo de la orienta.

**La jaro 1204 –**
komencis agadi la Sankta Inkvizicio. La eklezaj servistoj mort-turmentis kaj bruligis milionojn da homoj. Bruligado de homoj, praktike uzata en XX jarcento fare de nazioj, la unuan fojon estis amase aplikata fare de la kristana inkvizicio. La havaĵon de „heretikoj” transprenadis inkvizitoroj. Kvazaŭ ŝerco sonas, ke inkvizitoroj estis plej ofte elektitaj el inter dominikanoj kaj franciskanoj, kiuj ĵuris vivi malriĉe/mizere. Eĉ Vatikano permesas al neniu enrigardi/eniri arkivon kun dokumentoj rilataj al la agado de la inkvizicio. „La katolika Enciklopedio” asertas, ke inkvizicio „faris multe por la disvolvo de civilizacio”



Ĉu eble hispanon vi volas?
- Hispanon? Hispanon? Ho, ne!
Ne lavas hispano postaĵon dum bano.
Hispanon ne volas mi! Ne!



Ĉu volas vi hindon, fraŭlino?
- La hindon? La hindon? Ho, ne!
Asketa viv' hinda ne ŝajnas ĝuinda!
Ne volas mi hindon! Ho, ne!



Ĉu eble hungaron vi volas?
- Hungaron? Hungaron? Ho, ne!
Adultas hungaro kun tuta inaro.
Hungaron ne volas mi! Ne!




Ĉu eble italon vi volas?
- Italon? Italon? Ho, ne!
Perfortas italo virinon post falo.
Italon ne volas mi! Ne!










| | |
|---|---|
| 100 | CENT |
| 200 | DUCENT |
| 300 | TRICENT |
| 400 | KVARCENT |
| 500 | KVINCENT |
| 600 | SESCENT |
| 700 | SEPCENT |
| 800 | OKCENT |
| 900 | NAŬCENT |
| 1000 | MIL |

# NOVELA VIVO

**BUKAJ-AJ ESPERANTISTAJ FRENEZETULOJ**

**de Barry Friedman**

**Kolumbuso, Ohio**, estas plago, kloako, defalaĵejo de nenieco, kun mortema, senfina, senmensa agrikulturo kaj sporta obsedo. La popolo amas sian uson-futbalon kaj siajn Jozef-Cuervojn kaj BudLajtojn, siajn realecajn spektaklojn, siajn grandekranajn televidilojn, siajn stereofoniajn sistemojn, sian antaŭurbojn kun banalaj komercaj centroj, siajn sportajn aŭtojn, sian Maseratojn, siajn sport-utilecajn veturilojn, siajn promenadojn kun francaj pudeloj, siajn vanilajn latte-ojn ĉe Starbukoj, la malvarman, ventet-plenan, balzaman veteron, kiu enblovas el okcidenta Ontario kaj venas malsupren tra Miĉiganon kaj Detrojton en Ohion, preter la ekzotaj ruinoj de Toledo kaj Klevlando, tra la karn-kaj-terpoman, malgrand-animan sed ĉarman provincismon de kaduka Jongstojno, fola Zajnsvilo, malagrabla Dajtono, cindrogriza Astabulo, kaj bagatela Pataskalo.

**Farmistoj, profesoroj**, asekur-vendistoj, advokatoj, kuracistoj, senvetiĝistinoj, prostituitinoj, drogaĉ-vendistoj, blankulaj anglo-saksaj protestantanoj, judoj, italoj, irlandanoj, ĝermanoj, karibianoj, somalianoj, niĝerianoj, kaj Atestantoj de La Eternulo ĉiuj popolas ĉi tiun paroleman kaj senordeman ĉefurbon de la bukaj-a ŝtato. La domoj en la universitata regiono, germana vilaĝo, kaj itala vilaĝo estas lignaj kaj havas la malnov-stilan ĉarmon de tiuj domoj konstruitaj antaŭ la dua mondmilito. Ili ha- vas riĉe poluritan alabastron kaj ŝtonajn kanapojn sur la verandoj kaj velkintajn ŝtofojn sur la seĝoj kaj hamakoj. La ĉielo estas ĉiam brilkolor-griza kaj samtempe malgaj-nigra kaj ŝvebas super la vintra malagrableco dum la monatoj de nove-mbro al majo.


**Neniam estas ĉesigo de ĉi tiu mallumo;** la nuboj baras sunlumon kaj varmon. La ŝoseoj estas ŝtopitaj per aŭtoj veturigitaj per ekscititaj kaj koleraj mez-klasanoj kiuj estas ĉagrenantaj pro la pagado de la fakturoj por siaj ekscese multekostaj domoj en tiuj pu-raj famili-celitaj lasu-ĝin-al-Kastor-aj, tut-uso-naj antaŭurboj de Ŭortingtono, Poŭelo, Dublino, Malnova Ŭortingtono, kaj Hiliardo. Ili estas la perfektaj lokoj por kreskigi familion, maljuniĝi kun la amita edz(in)o, kolekti soci-sekurecon kaj pension, ludas ravan raŭndon de golfo, plani la feriojn al Eŭropo kaj la Karibio kaj la emeritiĝon en Florido aŭ en Teksasa kondominio.

Ili estas la idealaj lokoj por hormo-ne-tirataj adoleskantoj agi sur siaj seksaj scivolemoj en malpuraj parkejoj ekstere de la polaris-a kaj tutel-a butik-centroj aŭ la barns-kaj-nobla vendejoj je la 16-strata kaj segilmuelej-strata transirejo.

**Kolumbuso, Ohio** estas glora kaj intelekta rifuĝo ĉe la centro de la Ohiŝtata tereno, kie brilaj kaj kuriozaj kolegiaj studentoj povas ĝisfundlegi la senfi- nan kvanton de libroj, teatraĵoj, lernolibroj, akademiaj tezoj, kuirlibroj, mapoj, katalogoj, kaj kolorigaj libroj. Ĝi estas loko kie oni povas perdiĝi en la brua varieco sur Haj Strato dum evitante la senhejmajn virojn almozpetantajn por mo- neroj ekstere de cindrogriza, rompita, fatras-plena McDonalds-o en 18-a Avenuo kaj Haj. La viroj tie ĉiam krias je la naivaj suburbaj universitataj studentoj, "Donacu iom da monero, donacu iom da monero!"

**En tia urbo, en kiu stokejoj**, fabrikado, uzinoj, aŭtovendado, administrado de privataj kluboj, kaj aliaj similaj financ-ligataj profesioj regas la scenon, intelekta vivo estas malabundaj kaj tre multe dezirata. Homoj bezonas ion por di- stri sin for de la mizero de burĝaj mez-klasaj kutimoj. Tiam, kiam la kalkuloj, impostoj, kaj aŭtaj asekuroj estas pagitaj, kaj la geinfanoj estas senditaj al luksaj, privataj universitatoj en Ĉikago, Kalifornio, Bostono, Vaŝingtono D.K., Nov-Jorko, aŭ Nov-Ĵerzejo, oni devas havi manieron por amuziĝi preter la spektado de "**Observado la Kardaŝianojn**" aŭ de la metamorfozo de Bruso Jenero igi belan Kajtlinon Jeneron aŭ de la ŝokema kampanjo por la prezidanteco farita de Donaldo Trumpo en 2016 kiam li deklaris, ke Meksiko sendas ĉiujn siajn problememajn homojn al Usono, t.e. la meksikanoj kiuj estas ebriuloj kaj seksperfortistoj kaj mallaboristoj kiuj senĉese enkasigi monon de la usona registaro. Viro kiu havis tian bezonon estas Glito Aŝermano. Glito estis juda je la patra flanko kaj greka, itala, meksikia, dana, kaj kenja je la patrina flanko.

al la paĝo n-ro



Ĉu eble japanon vi volas?
- Japanon? Japanon? Ho, ne!
Vomaĉas japano per rizo sen pano.
Japanon ne volas mi! Ne!



Ĉu do kanadanon vi volas?
- Eĉ ne kanadanon? Ho, ne!
Ĉar li nur promesas, karesi forgesas.
Lin tute ne volas mi! Ne!



Ĉu eble kazaĥon vi volas?
- Kazaĥon? Kazaĥon? Ho, ne!
Rigida kazaĥo - sensenta monaĥo.
Kazaĥon ne volas mi! Ne!




Ĉu eble kirgizon vi volas?
- Kirgizon? Kirgizon? Ho, ne!
Ĉe kruda kirgizo malpuras ĉemizo.
Kirgizon ne volas mi! Ne!

# VIRTUALA VIVO














# N O V E L A   V I V O - 2

**BUKAJ-AJ ESPERANTISTAJ FRENEZETULOJ**

el la paĝo n-ro 16

de Barry Friedman

Li estis donita la <u>nomon **Glito**</u> ĉar tiam, kiam li naskiĝis, la kuracistoj ne povis reteni per siaj manoj lian korpon kiam li eliris de la patrina utero kaj faris sian eniron en ĉi tiun brutan mondon.

La kuracistoj deklaris, ke li estas la pli glita bebo, kiun ili iam ajn vidis dum siaj tutaj profesiaj jaroj, kaj tiel lia nomo estis elpensita.

**Glito kreskis en la normala**, prospera, burĝa ekzisto, kiu estas la usona revo por ĉiuj enmigrintoj kiuj fuĝas al Usono por eskapi malriĉecon, koruptecon, maljustan revenuan malegalecon, neeblan vivkondiĉojn, kaj malbonkvalitan sanzorgon en siaj hejmlandoj.

Li havis agrablajn lernejajn dancfestojn, kissesiojn en la malantaŭa sidloko de la Buiko de sia patro, kaj kaŝu-vin-ajn ludojn en la verdaj arbustoj de la enorma suburbana najbaraĵo kun siaj amikoj, kiuj estis infanoj de malsamaj fonoj kun rugxaj vangoj kaj larĝokula, infanaĝa senkulpeco.

**Lia patro estis en Kolumbuso** ekde kiam li diplomiĝis en universitato en la Nordoriento, aŭ Konektikato aŭ Nov-Ĵerzejo, kaj trovis sin nekapabla atingi enlason en leĝolernejon ĉe Kolumbio aŭ Jalo aŭ Kornelo aŭ Harvardo, kion sia patro deziris ĉar li sciis, ke diplomoj de tiuj supronivelaj hederoligaj lernejoj estis la solaj diplomoj kiuj estas signifoplenaj al la grandaj leĝofirmaoj en Nov-Jorko aŭ Ĉikago aŭ Losanĝelo, kie ĉiuj brilaj junaj leĝolernejaj postdiplomitoj deziras labori por perlabori tiun centmildolaran pojaran salajron kaj atingi la sukceson al kiu la gepatroj puŝas ilin kun la celo ke vivo ne ŝajnus esti malplena, sensignifa, malluma trogo al maljuneco kaj morto. Glito kaj la patro kun ĉagreno akceptis matrikuli ĉe la leĝolernejo ĉe Kapitolo Universitato en urbocentro Kolumbuso ĉe Kvara Avenuo.

**Tio estas du blokoj for de Stratoj Alt kaj Brod**, ĉirkaŭita de almozuloj kun poliestirenaj tasoj, kiuj petas por la ŝanĝmono esti enfaligita de la senpaciencaj, arogantaj profesiuloj, kiuj laboras en la teknologiaj centroj aŭ en la asekura kompanio Nationwide aŭ en la kongresejoj. Estas kolombiaj kolbasaj budoj kaj perfortaj virinoj kun tatuoj kaj malalttranĉitaj roboj.

Estas malnovaj flegistinoj atendante por la buso por eliri al la orienta flanko aŭ al la pli malvirtaj kvartaloj kiu konektas kun Alt Strato kiam oni vojaĝas norden al Mallonga Nordo kaj la universitatejo, kie senrim- edaj postdiplomaj studentoj, liber-spirituloj, drogaĉvendistoj, kaj kafej-laboristoj vivantaj en malpureco en eta apartamentoj priploras pri la bezonon eskapi al Kalifornio aŭ Arizono sed fakte neniam forrompos for de la kruelega subpremado de la mezokcidenta-stila fermita menso.

**Patro studis ĉiutage ĉe Kapitol-Universitato** interne de tiu ĥaosa ĉirkaŭaĵo de la 1970-aj jaroj. Tio estis la epoko de Niksono kaj Fordo kaj Kartero, disko, ok-trakiloj, rulsketadaj himnoj, la kantada grupo Reĝino, Ŭatergat-o, la energia krizo, la rompigo de la baroj kun Ĉinio, la alteco de la Malvarma Milito, la Nov-Jorka senkurentiĝo, Filo-de-Sam-o, la juda poŝtoficeja laboristo kiu murdis junulinojn pro la komandoj de demona hundo, Serpico, la filmo "**Ĉiuj la Viroj de la Prezidento**", Studio 54, la Dukoj de Hazardo, kaj poliesteraj vestoj.



Ĉu eble kozakon vi volas?
- Kozakon? Kozakon? Ho, ne!
Ĉar estas kozako murdisto laŭ fak
Kozakon ne volas mi! Ne!



Ĉu eble kroaton vi volas?
- Kroaton? Kroaton? Ho, ne!
Frenezas kroato pro seksa malsat
Kroaton ne volas mi! Ne!




Ĉu eble kubanon vi volas?
- Kubanon? Kubanon? Ho, ne!
Ĉe bubo el Kubo kac' duras por p
Kubanon ne volas mi! Ne!



Ĉu volas vi kurdon, fraŭlino?
- La kurdon? La kurdon? Ho, ne!
Ĉar kurdon en urbo konsolas mas
Ne volas mi kurdon! Ho, ne!







# B O M B A   V I V O







# SANA VIVO

**„Sana en malsana ĉirkaŭaĵo”** – tia estis titolo de la scienca artikolo, prilaborita de la usona profesoro pri psikologio David Rosenhan, publikigita en prestiĝa scienca ĵurnalo „**Science**” en 1972.

La artikolo temas pri sepaj partoprenantoj de eksperimento, kiu post la publikigo skuis psikatrion.

Rosenhan eklaboris kun sep kunlaborantoj (3 psikologoj, kuracisto pri infanaj malsanoj, studento pri psikologio, pentristo kaj hejm-mastrino).

Antaŭ ol ili komencis la ĉefan parton de la eksperimento, ili konvene al tio prepariĝis; dum kelkaj tagoj ili ne lavis dentojn, la viroj ne razis sin, sekve vestitaj per iom malpurigitaj vestoj, sub falsa nomo telefonis al psikatria hospitalo, plendante, ke ili aŭdas iujn voĉojn.

Neniun el ili oni diagnozis kiel sana!

Ses el la sepaj ricevis diagnozon: skizofrenio, unu – depresio. Kiam ili jam ricevis la ekzamenrezultojn, komencis konduti tute normale, observi la hospitalan regularon kaj traktis personaron kaj kuracistojn trankvile, milde, afable kaj logike, ĉar ili celis kiel eble plej rapide konvinki la kuracistojn, ke ili estas psike sanaj kaj memstare povas forlasi la hospitalon.



Rapide evidentiĝis, ke unufoje akceptitan diagnozon estas malfacile forigi kaj per iu ajn maniero konvinki kuracistojn pri sia racia menspensado. La sciencistoj kun malkvieto observis plialtiĝantan psikan kaj fizikan brutalecon de la hospitala personaro kontraŭ hospitalizitajn. Jam en la komenca fazo la eksperimento evidentiĝis tiom danĝera, ke parto de la partoprenantoj eksentis timon antaŭ batado aŭ perforto.

En tiu situacio oni postenigis juriston kun kiu oni ekplanis eventualajn agojn, se okazus iu damaĝo aŭ morto de iu el la partoprenantoj de la ekspeimento.

Post la publikigo fare de Rosenhan rezultojn de tiu eksperimento, personaro de iu fama psikiatria hospitalo konstatis, ke ĉe ili tia falsa diagnozo estus malebla.

Por pruvi, ke tio tamen eblas, Rosenhan agordis kun la hospitalo, ke dum la trimonata periodo li sendos sekvajn siajn pseŭdopacientojn, kiuj provos eniri la hospitalon. Rezulto de eksperimento estis tia, ke inter 193 novaj pacientoj 41 oni agnoskis kiel la partoprenantoj de Rosenhan, kaj 42 aliaj oni agnoskis kiel „suspektindaj”.

Reale Rosenhan sendis neniun psŭdopacienton kaj ĉiuj kazoj de „malkaŝo” de simulantoj estis falsaj.



Ĉu volas vi latvon, fraŭlino?
- La latvon? La latvon? Ho, ne!
Li laŭdojn kolektas, virinojn neglektas.
Ne volas mi latvon! Ho, ne!



Ĉu eble litovon vi volas?
- Litovon? Litovon? Ho, ne!
Amoras litovo per movo de bovo.
Litovon ne volas mi! Ne!



Ĉu eble kubanon vi volas?
- Kubanon? Kubanon? Ho, ne!
Ĉe bubo el Kubo kac' duras por pubo.
Kubanon ne volas mi! Ne!



Ĉu volas vi maŭron, fraŭlino?
- La maŭron? La maŭron? Ho, ne!
Post amo de maŭro nur restas bedaŭro.
Ne volas mi maŭron! Ho, ne!

**ENIGMA VIVO**

# FREŜA MAGIA KVADRATO


nur por tiuj, kiuj ŝatas pensi ! aliaj - lasu ĝin

1. proksima personin' ................
2. moner' .................................
3. senmovebla ..........................
4. ŝirmil' (fenestra) ..................
5. planata dezir' .......................
6. derivi ....................................

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | | | | | |
| 6 | | | | | | |

**Kiumaniere solvi krucvortenigmon ?**

Unue oni devas iomete pripensi !
Por ke solvado estu pli klara - enskribu majuskle literojn! Per sageto eniru kvadrateton kaj musklaku ĝin (per maldekstra puŝbutono).
Enskribu ĝustan literon de la vorto kaj iru al sekva kvadrateto. Enskribu sekvan literon kaj iru ... ktp, ktp.
Por kontroli ĝustecon de magia kvadrato - iru al la lasta paĝo... SED...
Unue vi devas iomete pripensi...




View of Kaysersberg. Th. Müller from Strasbourg illustré


# HUMURA VIVO



©2011 RUI DUARTE All rights reverved
http://duartecartoon.blogspot.com







ROOZCARTOON.COM
Cartoon: Mohammad Kargar








# JUDA VIVO

**Enkonduko al la anekdotoj:**
Judaj religiaj studoj (Talmudo) postulas altan intelektan nivelon por kompreni la pensmanieron de la egzegistoj (interpretistoj) de la Biblio. Tiu pensmaniero nomiĝas hebree Pilpul ("piprumado": akra interdiskutado ). Ĝi estas speco de intelekta gimnastiko de la cerbo, konsistanta el teoriaj analizoj de hipotezaj situacioj. Homo, kiu sukcesas disvolvi tiun pensmanieron, povas tre facile krei humuraĵojn, ĉar en plejmulto de la ŝercoj oni trovas teoriajn analizojn de hipotezaj situacioj.



Okazis entombigo de fama riĉulo. La ĉareton, kiu portis la mortinton, sekvis plorantaj parencoj kaj geamikoj. Alvenis fremda homo kaj aliĝis al la grupanoj, same ploranta.
Demandis lin unu de la proksimuloj: "Kial vi ploras? Vi ja ne estas parenco de la mortinto."
Resopondis la ulo: "Ĝuste pro tio mi ploras..."

Fiera juda patrino sendis sian filon al la lernejo unuafoje.
"Estu bona knabo, mia BUBALE *(ĝenerala karesnomo por infanoj, en la jida lingvo)!*", ŝi diras. "Gardu vin kaj pensu pri Panjo, ***mia dolĉaĵo***! Panjo amegas vin, ***mia sukeraĵo***! Venu poste hejmen rekte per la buso, ***mia mielo***."
Posttagmeze ŝi atendas la buson kiu revenigas sian filon. Vidante lin ŝi demandas: "Kion ***mia amo*** llernis en la unua tago?"
Respondis la knabo: "Mi lernis ke mia nomo estas David."

**Ĉu vi kuiras ĉine?**
Ajzik Kohen (Isac Cohen) manĝis en ĉina restoracio (same kiel ĉiu "bona" judo en Usono...) kaj babiletis kun la kelnero Ŭong Ĉong (Wong Chong).
Kohen: "Vi, ĉinoj, estas konsiderataj kiel tre saĝa popolo."
Ŭong: "Tio veras. Ĝi estas pro tio, ke nia kulturo estas tre antikva: 4,000 jarojn. Sed ankaŭ vi, judoj, estas tre saĝaj. Ĉu mi pravas?"
Kohen: "Jes, ni estas saĝaj. Nia kulturo aĝas 4,500 jarojn."
Ŭong: "Tio tute ne eblas! Kie do vi manĝis dum 500 jaroj?"

**Juda patrino**
Poldevena juda patrino Roza sidas ĉe la frizistino en Tel-Avivo (sub la harsekigilo...).
Frizistino: "Nu, kiel fartas via filino?"
Roza: "Sufiĉe bone, dank` al Dio. Ŝi edziniĝis al bonega viro, bonstata. Li havas tre bonan postenon en granda firmao kaj pro tio ŝi rezignis pri la laboro de sekretariino. Ŝi povas do sidi hejme sed devas nek kuiri nek purigi la hejmon, ĉar la edzo zorgis pri tio, ke ŝi havu
kuiristinon kaj purigistinon. Li ankaŭ prizorgis por vartistino por la ĉarmaj 2 infanoj, do ŝi ne devas tro okupiĝi pri ili."
Frizistino: "Bonege. Kaj kiel fartas via filo?"
Roza: "Ho, li estis malbonŝanca kaj lia vivo estas malsukcesa. Li edziĝis al terura virino. Ŝi neniam kuiras kaj pro tio li devis dungi kuiristinon. Ĉar ŝi ne volas purigi la tapiŝojn kaj la polvon, li devis akiri purigiston. Li devas labori kiel azeno ĉar ŝi ne trovis laborolokon. Krome, pro tio ke ŝi neglektas mian nepon, li estis devigita dungi vartistinon."

**Helpe de Dio**
Juda junulino (de ortodoksa familio) venigas unuafoje sian fianĉon Abrahamo al la gepatroj por vespermanĝo. Post la manĝo la patrino petas de la patro prezenti al la fianĉo diversajn enketajn demandojn.
La patro sidiĝas aparte kun Abrahamo kaj komencas "enketi":
Patro: "Kiuj estas viaj vivoplanoj?"
Abrahamo: "Mi studas en Jeŝivo."
("Jeŝiva": multjara juda seminaro por studi la religiajn skribaĵojn kaj ankaŭ por fariĝi rabeno).
Patro: "Tre bele, sed kiamaniere vi prizorgos materie mian filinon, kiu kutimas je sufiĉe alta vivnivelo?"
Abrahamo: "Mi studos kaj Dio zorgos por ŝi."
Patro: "Kaj kiamaniere vi povos aĉeti por ŝi belan geedziĝan ringon, kiun ŝi ja meritas?"
Abrahamo: "Mi koncentriĝos je la studado kaj Dio prizorgos tion."
Patro: "Kaj kiu prizorgos la estontajn infanojn?"
Abrahamo: "Ne zorgu, sinjoro. Dio prizorgos ankaŭ ilin."
Pludaŭris la interparolo, tiel ke je ĉiu demando de la patro la junulo respondis per la sama frazo: "Dio prizorgos tion".
Post kiam la fianĉo iris hejmen, la patrino demandis la edzon: "Nu, kion vi parolis kun li?" Respondis la patro: Li ne havas laboron; li ne havas planojn; sed la bona afero estas, ke li pensas ke mi estas Dio."

Ĉiuj anekdotoj arigis
Josefo Shemer - Israelo



Ĉu do meksikanon vi volas?
- Eĉ ne meksikanon... Ho, ne!
Ĉe vir' el Meksiko tordiĝas testiko.
Lin tute ne volas mi. Ne!




Ĉu volas vi nederlandanon?
- La nederlandanon? Ho, ne!
Ul' el Nederlando koitas sen frando..
Lin tute ne volas mi! Ne!



Ĉu eble norvegon vi volas?
- Norvegon? Norvegon? Ho, ne!
Diboĉas norvego nur en malvarmego.
Norvegon ne volas mi! Ne!



Ĉu do portugalon vi volas?
- Eĉ ne portugalon? Ho, ne!
Ĉar ĉe portugalo moralo en falo.
Lin tute ne volas mi! Ne!




**Karikaturoj:**
Angela Merkel
Kim Yong-Un
Bashar al Assad
Salvadore Dali
Erdogan
Dilma Roussef
Netanyahu
Mario Vargas Llosa

**Magia kvadrato:**

1. AMIKIN'
2. MONUNU'
3. INERTA
4. KURTEN'
5. INTENC'
6. NUANCI